Jar-Raporto pri PERKORESPONDA ESPERANTO-KURSARO (ELNA-PEK)

De la 8-a de julio, 2008, ĝis la 1-a de majo, 2009

Ĉijare entute aliĝis 6 novaj kursanoj, 1 finstudis kaj 88 ankoraŭ lernas , kvankam la plej multaj ne aktivas. Lastjare aliĝis 2 novaj, finstudis 1, kaj entute lernis 87. Jen la detaloj:

NIVELO 1: Tri novaj kursanoj aliĝis; neniuj finstudis, kaj entute estas nun 56 kursanoj. Lastjare 2 aliĝis, 1 finstudis, kaj entute estis 53 kursanoj.

Fidele deĵoris kiel instruanto E. James Lieberman. (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas JEN NIA MONDO I, kun KD-oj.

Kurs-kotizo: $63, el kiu la instruanto ricevas $16.50 kaj la administranto $3.00.

NIVELO 2: Tri novaj kursanoj aliĝis, kaj 0 finstudis Lastperiode 1 aliĝis kaj 1 finstudis, kaj estis 21 kursanoj (estas nun 25).

Instruanto: E. James Lieberman (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas JEN NIA MONDO II kun KD-oj.

Kurs-kotizo: $63, el kiu la instruanto ricevas $16.50; la administranto, $3.00.

NIVELO 3: Neniuj kursanoj aliĝis kaj 1 finstudis (John Edsall Strickland el Fort Myers FL). Lastperiode 2 aliĝis, kaj neniuj finstudis. Entute estas nun 5 kursanoj; lastjare, 6.

Instruanto: Doroteo Holland (Santa Barbara CA)

La lecionoj baziĝas sur la unua duono de Vojaĝo en Esperanto-Lando de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: $73.75

NIVELO 4. Neniuj novaj kursanoj aliĝis; neniuj finstudis ĉijare; same lastjare; ankoraŭ restas 5 kursanoj. Lastjare same. La administranto pretas instrui se venos novaj kursanoj.

La lecionoj baziĝas sur la lasta duono de Vojaĝo en Esperanto-lando. de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: $73.75

Estas kuraĝige ke ĉijare aliĝis 6 novaj kursanoj (eble helpis ke mi aperigis tut-paĝan aliĝilon en Usona Esperantisto (2009/1). Tamen, plejparte nur tiuj kiuj ne havas aliron al komputilo (ĉefe maljunuloj) interesas pri paperaj perkorespondaj kursoj. La junuloj kiuj volas lerni Esperanton turnas sin al la reto (<edukado.net> kaj <lernu.net>) Mi ne scias kiuj instruas tiunj kursojn nek kiom da aliĝantoj ili havas.

Financa Raporto

Saldo la 8-an de julio, 2008:	$ 29.65	
Ricevita de E-USA	$112.50	
Tuta bonhavo.....		$142.15
Elspezoj: Al instruantoj por ĉiuj novaj kursanoj	$ 97.00	
Por poŝto de la administranto:	$ 5.73	
Al kaligrafiisto	$ 10.00	
Tutaj elspezoj		$112.73
Saldo la 1-an majo, 2009.....		$ 29.42

Doroteo Holland, Administranto
dorothyjeanh@gmail.com